# NIA PONTO

Grupo Esperantista de Bilbao
Barrencalle Barrena, 7-1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanujo)
Redaktas:
Jesús Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
💻 esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home
En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €. Juna(ĝis 30 jaroj): 20 €.
**KUTXABANK-konto. IBAN-kodo: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**JULIO/SEPTEMBRO 2021** **Nro. 128 (3/21)**




## Ĉu nova Esperantujo en la Valo de Mena (Burgos)?

Kelkaj membroj de la E-Grupo de Bilbao helpas en la konstruado de estonta Esperantujo en la Valo de Mena (Burgos), 50 km. for de Bilbao. Vidu raporton sur la lasta paĝo de tiu ĉi Nia Ponto.

**LOKE ...**

## Renovigo de la retejo de la Grupo.




Nia retejo estis ĝisdatigita kaj modernigita dank' al laboro de ĝia mastrumanto, nia amiko Pako. Tio okazis la 25an de junio.

Ekde nun la retpaĝoj ŝarĝiĝos pli rapide kaj ili aspektos pli allogaj. La nova dezajno permesas ankaŭ ŝanĝi la formaton laŭ la uzata konektilo, ĉu poŝtelefono, ĉu tablojdo, ĉu komputilo, ĉiam kun la celo prioritati la videblecon kaj la enhavon.

La adreso restas same: https://sites.google.com/site/esperantobi/home

## Forpaso.



Q. E. P. D.

**Doña María Ángeles Mielgo Martos**

Falleció en Bilbao el día 16 de julio de 2021, a los 74 años de edad, habiendo recibido los SS. SS. y la B. A. de Su Santidad.

Sus padres: Dámaso (✝) y Juana Dolores (✝); tíos, primos y demás familia.

**MISA FUNERAL: MAÑANA, lunes, día 19, a las SIETE de la tarde, en la parroquia Santa María, de Sestao.**

Tanatorio Bizkaia. Retuerto, 40. Tfno. 944743496.

La 16an de julio forpasis nia amikino María Ángeles Mielgo. Ŝi estis filino de Dámaso Mielgo Ostolozaga, unu el "niaj blinduloj", tiuj membroj de la Nacia Organizo de Blinduloj (O.N.C.E.), kiuj tiom multe kontribuis al renaskiĝo de la E-Grupo de Bilbao post la hispana interna milito. Eĉ dank' al ili nia Grupo povis uzi oficejon en la sidejo de O.N.C.E.

María Ángeles, se ne tute blinda, ankaŭ suferis problemojn pri vidkapablo, do jam ne eblis, ke ŝi vizitu nian sidejon. Tamen, ŝi informiĝis pri la agadoj de nia rondo kaj ĉiujare regule aĉetis nian kristnaskan loterion.

Ke ŝi pace ripozu.

## La Grupo denove malfermita.

Post la somera fermiĝo, nia Grupo denove malfermiĝas. Se vi deziras ree renkonti geamikojn aŭ praktiki Esperanton, tie vi trovos nin en la kutima horaro: vendrede, inter la 19:30 kaj la 21:00 h.

## LOKE ...

## Vizitis nin ...



La 29an de julio vizitis nian sidejon malnova konatulo de la E-Grupo de Bilbao: Carlos Barrio.

Nun li loĝas en Bonn (Germanujo) apud lia edzino Ulrike, kiu ankaŭ estas esperantistino.

Sur la foto, Carlos kaj Ulrike akompanataj de la bilbaoanoj Igone kaj David.




La 21an de aŭgusto vizitis nian urbon Vicente Manzano (Viko) kaj Unika.

Ili venis el Sevilo kaj estis gastigataj de nia amiko David.

Sur la foto, Carlos, Igone, Viko, Unika kaj David.

## Kristnaska loterio / Lotería de Navidad.




Kiel kutime, la Grupo ankaŭ ĉi-jare vendos kristnaskan loterion pere de biletoj eldonitaj tute en Esperanto. La disvendado komencos tuj post la festotago de la 12a de oktobro, t.e., **la vendredon 15an de oktobro**. Ni ludos la numeron **33.274**.

Después del puente del 12 de octubre, comenzaremos la venta de la tradicional lotería de Navidad, es decir, **a partir del viernes 15 de octubre**. Este año vamos a jugar con el número **33.274**.

**H.E.F.**




# Virtuala Kongreso 2a, 3a Oktobro 2021

Ĉi-jare, pro pandemio kaj unu jaron plian, ne eblis okazigi la programitan hispanan kongreson en Comillas (Kantabrujo).

Anstataŭe kaj kun la espero okazigi ĝin la venontan jaron, HEF organizis virtualan kongreson la 2an kaj 3an de oktobro.


La programo disponeblas ĉe:
**https://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/programo**

## Kaj la 80a Hispana Esperanto-Kongreso.




Finfine, post la interkonsento atingita de la Hispana Esperanto-Fedracio (HEF) kun la Kantabra Esperanto-Asocio (KantEA) kaj la loka Magistrato de Comillas, oni jam povas anonci ke la 80a Hispana Esperanto-Kongreso okazos en Comillas, de la 29a de aprilo ĝis la 3a de majo, en la jaro 2022**.**
Comillas atendas vin!
La LKK

## Omaĝo al Federico García Lorca.




Ene de la virtuala kongreso de HEF, unu el la ĉefaj programeroj estis omaĝo al Federico García Lorca okaze de la 85a datreveno de lia murdo, per la reeldono en bita formo de lia "Cigana romancaro" (tradukita al Esperanto, antaŭ 50 jaroj, de Fernando de Diego) kaj la papera publikigo de antologio de liaj poemoj, tradukitaj en Esperanton fare de Miguel Fernández.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 75. Septembro 2021)*

**H.E.F.**

## CSIC proponis kunlaboron al HEF.

La hispana CSIC (Centro Superior de Investigaciones Científicas / Alta Centro por Sciencaj Esploroj) proponis al HEF ke Ĝi partoprenu en la traduko de “lerneja scienca kalendaro”, projekto kies celo estas enkonduki la sciencan kulturon inter lernejanoj kaj vekigi ilian intereson pri tiu branĉo de la homa kulturo.

La kalendaro prezentos, por ĉiu tago de la jaro, ian sciencan aŭ teknologian datrevenon. Ĝi estis jam tradukita al la angla kaj al la diversaj lingvoj hispanaj: kataluna, vaska/eŭska, astura, galega kaj aragona. La venontan jaron aperos la francan version kaj oni demandis al ni ĉu eblos la apero de Esperanta versio.

Ni substreku ke temas pri grava kaj ege serioza propono de la plej alta instanco en Hispanio rilate sciencan esploradon, kie laboras la plej kleraj sciencistoj de la lando.

Kompreneble, HEF diris “jes” al tiu propono. Jam stariĝis skipo de tradukantoj kaj baldaŭ komencos la laboroj.

## Denove kursoj de Esperanto en la Universitato UNED.

Periodo por enskribiĝo malfermiĝis denove ĉijare en la kursoj proponitaj de la Centro pri Lingvoinstruado (CUID) de la Universitato por Neĉeesta Edukado de Hispanio (UNED). Ĉijare denove eblas enskribiĝi en la baza kurso (per kiu oni atingas je la fino de la jaro la nivelon A2 laŭ la Eŭropa referenckadro por instruado de lingvoj), kaj en la nivelo B1, al kiu povas aliri la homoj trapasintaj la nivelon A2 en antaŭaj okazoj kaj ankaŭ tiuj kiuj jam havas iajn konojn de Esperanto pro antaŭa lernado kaj trapasas la pretigitajn nivelekzamenojn.

Ni memorigas ke la kursoj de Esperanto disvolviĝas kun la apogo de Hispana Esperanto-Federacio, pere de kunlabora interkonsento kun la Universitato. Nia asocio zorgas pri la pretigado de kriterioj, ellaborado de materialo kaj selektado de la instruistoj. Pri la organizado zorgas la CUID, en kies retejo oni povas legi la detalojn kaj povas formaligi la enskribiĝon. La periodo finiĝas la 22an de oktobro.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 75. Septembro 2021)*

## Studaĵo pri Esperanto el antropología vidpunkto.

Nia amiko Jorge Brasal prezentis sian finstudan laboraĵon (“*Trabajo de fin de grado”*) por kompletigi sian studon en Socia kaj Kultura Antropologio (“*Grado en Antropología Social y Cultural”*) en la Aŭtonoma Universitato de Madrido. La titolo estis “El Esperanto: lengua y comunidad en el siglo XXI” (“Esperanto: lingvo kaj komunumo en la XXI jarcento”). Li atingis noton de 9,4. Gratulon al li!

La teksto estas konsultebla en la retejoj de la Bitoteko kaj en Edukado.net.

*(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 75. Septembro 2021)*

**H.E.F.**

## Ana Manero prezentis Bitotekon internacie.



Dum la monato aŭgusto Ana Manero havis okazon prezenti la Bibliotekon Juan Régulo Pérez kaj la Bitotekon de HEF en renkonto de la projekto *Reta Edukado Nun*, financiata de Eŭropa Unio per la programo Erasmus+, dediĉita interalie al la temo de pretigado de ciferecaj dokumentoj, efika arkivigado kaj bonkvalita libro-eldonado. Ĝi okazis en Đurđevac, Kroatio, de la 12a ĝis la 16a de aŭgusto 2021, gastigata de Dokumenta Esperanto-Centro, kaj estos spektebla rete.

La projekto estas kunordigata de Bjalistoka Esperanto-Societo (Pollando), kaj partoprenas Dokumenta Esperanto-Centro (Kroatio), Esperanto-KulturCentro Tuluzo (Francio), Bunta Esperanto-Asocio (Italio) kaj Kosmo Strategio ltd. (Britio).

Denove Ana prezentis la Bitotekon kadre de Internacia Simpozio pri la lingvoj en transnacia kunteksto, en la Centro Max Bloch por Esplorado en Sociaj Sciencaj de Berlino, la 8an de septembro. La seminario kunigis esploristojn kaj zorgantojn de arkivaj materialoj de diversaj partoj de la mondo. Menciindas ke unu el la sesioj temis pri la specifeco de Iberio, kun prelegoj de Pilar Requejo de Lamo kaj Javier Alcalde.

Memoru ke Bitoteko estas kolekto kun libera aliro. Nepre vizitu tiujn tro malmulte konatajn retajn trezorojn (http://bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/).

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 75. Septembro 2021)*

## Pliaj Bitotekoj kaj katalogoj.

Krom la menciita *Bitoteko* de Hispana Esperanto-Federacio, en Hispanio havas sian bazon aliaj iniciatoj por arkivi kaj rete konservi tre valorajn dokumentojn en Esperanto, tre meritplenaj kaj vizitindaj.

Unu el ili estas Bibliotekoj.org, la aro de projektoj de nia samideano Javier Guerrero, el kiu eblas viziti la katalogojn de pluraj katalunaj bibliotekoj kaj arkivoj kiel la Biblioteko Molera de Moià aŭ la biblioteko de Kataluna Esperanto-Asocio en Sabadell, kaj kie eblas aliri multnombrajn historiajn gazetojn, de altega graveco kiel Literatura Mondo aŭ Popola Fronto.

Alian trezoron de dokumentoj, ĉefe revuoj, eblas trovi en Bitarkivo.org, mastrumata de Iván García. Preskaŭ 10 000 numeroj el pli ol cento da titoloj, kun grandega varieco de eldonlokoj, formatoj, enhavoj aŭ datoj.

Nepre vizitu ilin. Neniam tiom facilis aliri la esperantan kulturon.

*("La Bitbulteno" de HEF. Nro. 75. Septembro 2021)*

# TRA LA MONDO ...

## Batalo por repurigi la lagunon Mar Menor en sud-orienta Hispanio.



Tiu granda laguno estiĝis dank' al tre longa malalta sablo-benko. Ĝi estas la plej granda salhava laguno de Eŭropo. Ĝi estas malprofunda. Pro la bela regiono estas granda turismo, sed eble pli forte minacas la agrikulturo (por eksporto) kiu ek de ĉ. 10 jaroj etendiĝis preskaŭ al la bordo de la laguno.

Aparte pro vetera katastrofo en 2019, sed ankaŭ kontinue nutraĵoj kaj pesticidoj de la agrikulturo enfluas en la lagunon. Pro tio ĝi estis eŭtrofigita. La sekvoj estis ke algoj abundas, laminario k.s. plantoj ne plu havas sufiĉe da lumo krome mankas oksigeno.




Pro tio fiŝoj preskaj malaperis tie.

La naturprotektantaj CSO-oj diras ke la registaro estas respondeca, ĉar permesis (aŭ ne interesiĝis) agrikulturan monokulturadon en la proksimeco de la bordo, kaj ankaŭ troan turismon.

Jen ĝenerala informo en la hispana: https://wikimurcia.com/mar-menor/

*(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj. 25/06/2021)*

## Monsunaj inundo-katastrofoj ankaŭ en Eŭropo, brulantaj arbaroj en norda Ameriko.

Nekonata pluvego trafis kelkajn regionojn en Germanio (simile okazis jam plurfoje ekde 2002 en meza Eŭropo), malgrandaj riveretoj iĝis riveregoj kiuj detruis au eĉ formetis domojn, aŭtomobilojn kaj tranĉis stratojn ktp.; akvo kaj kurento-provizo estis detruita. Mortis eble 200 homoj, ankoraŭ oni ne scias detale.

Dum babilado de „ekologiuloj“ dum la Virtuala Kongreso“ de UEA mi aŭdis ke tiaj pluvegoj estas normalaj en Pakistano aŭ Nepalo, ke ĉi-kaze mortas eĉ 2000 homoj. Samtempe en nordokcidenta Usono kaj Kanado bruladas arbaroj.

„Kulpas“ la „omega-vetero“, la ĉirkaŭpolusa ĝet-fluo (angle: jet-stream, en eo.wikipedia.org: ŝprucfluo (?)), vento en la altaj tavoloj de la atmosfero (ĝis al la Stratosfero) nuntempe orientiĝas preskaŭ en cirkloj (formo simila al la greka litero „omega“). Oni supozas ke tio estas kaŭzita de la altigita monda temperaturo, kiu kaŭzis malfortigon de tiu vento-fluo.

Nun oni diskutas kio necesus por eviti tiajn sekvojn por la infrastrukturo: ne konstrui domojn apud riveretoj, pli bone konstrui stratojn kaj kablo-liniojn en vundeblaj regionoj. Etendi la spacon apud riveroj kie akvo povas sterniĝi.

*(AVE-Asocio de Verduloj Esperantistaj. 20/07/2021)*

## La leona reĝo. Fana Dublado en Esperanto.

Jen sceno el “La leona reĝo”, Esperante: https://youtu.be/ihAm9QeuLKM

*(María Zocato. 05/10/2021)*

# En vilaĝeto apude de Villasana de Mena iam oni aŭdos Esperanton kaj flirtos la E-flago.

Mi nomiĝas Karlo kaj estas membro de la E-Grupo de Bilbao. Ĉiun semajnfinon ekde junaĝo mi alkutimiĝis marŝi tra la montaro aŭskultante la sonojn de la Naturo.

Antaŭ ses jaroj, mia kunulino kaj mi decidis aĉeti terenon en kampara vilaĝo. Mi trovis ĝin en la Valo de Mena, en unu el ĝiaj vilaĝetoj, kiu nomiĝas Kovideso (Covides). La ĉirkaŭa pejzaĝo sorĉis min: simple ĝi estas mirinda. La valo estas ege verda, ĉirkaŭata de vidaltira montaro, kies plej alta pinto nomiĝas “Peña Mayor” (Pénja Majór) kaj kies deklivoj naskas la riveron “Cadagua” (Kadágua).



Nia projekto celas starigi tri konstruaĵojn. Ni preskaŭ finis la plej malgrandan, kiu estos seka banĉambro. La dua konstruaĵo, baldaŭ ekkonstruata, estos multfunkcia. Kaj post du jaroj ni planas komenci la lastan: nia propra loĝejo.

Ĉiuj ejoj estos biokonstruataj kaj starigitaj de ni mem. La materialoj uzataj estos ekologiaj: ŝtono, sablo, koto, ligno, pajlo, hidraŭlika kalko, ktp. La tuto estas instiga kaj bela defio, … sed ankaŭ tre multekosta. Tial helpo de eksteruloj estas grava por sukcesi en malmola kaj laciga laboro. Ekzemple, por konstrui la strukturon de la seka banĉambro ni ricevis la helpon de dek naŭ homoj dum du finsemajnoj.



Tamen, ni ne celas nur atingi la helpon de aliaj, sed ankaŭ krei komunumon per kunlaboro, ene de kiu oni laboru por individua kaj kolektiva bono, por kunhavigi sciojn, spertojn, ridetojn, brakumojn, manĝaĵojn, ktp. Sendube, la homaro en sia plej pura formo.

Kompreneble, Esperanta komunumo ankaŭ devas partopreni la projekton, tiel ke ĝi mem serĉas rilatigi la Naturon kaj la homojn pere de ekologia konstruado, komuna laboro kaj Esperanto. La unua kontakto kun Esperanto okazis la pasintan aŭguston, kiam tri membroj de la Grupo de Bilbao partoprenis la duan fazon de la fundamentaj instalaĵoj de la dua konstruaĵo. Ni dankegas al Igone, David kaj Iñigo ilian helpon kaj la portadon de Esperanto al la Valo de Mena. Ni revas pri internacia Esperanto-renkontiĝo, eĉ pri organizado estontece de E-laborejon, kiam la cirkonstancoj estos pli favoraj al ni. Sed per tiuj ĉi alineoj vi almenaŭ sciiĝas pri nia projekto kaj se vi iam ŝatus partopreni en ĝi, ni tre dankus vian partoprenon. Por kontakti nin vi povas skribi al ĉi tiu retpoŝto: lur_maitea@yahoo.es

Ni esperu tutfini la tutan projekton kaj tiam E-flago kaj zamenhofa foto havos sian lokon en ĝi. Ni ankaŭ intencas fari fotoekspozocion kun rilato al Esperanto. Samtempe, ni planas konstrui lokon por loĝigi homojn, kiuj dezirus kunvivi kelkajn tagojn kun ni; esperantistoj, kompreneble, ankaŭ estos bonvenaj.

*(C. Ll., el E-Grupo de Bilbao)*